# Dana Fervojisto

# 1

*ISSN: 1397-9914*

**71a jareldono** **Junio 2018**



Vroclavo, kie okazis la IFK fine de majo ... 2 DEFA-anoj partoprenis kune kun ĉirkaŭ 100 aliaj IFEF-anoj

# DEFA ĝeneralkunveno okazis 1/5-2018.

DEFA okazigis la jarkunvenon ĉe Karen en Næstved. Kiel kutime dum la lastmasintaj jaroj ni ne grandioze kunvenis kaj festis, sed ni kune manĝis kaj poste traktis la temojn kutimajn.

La mesaĝo de la prezidanto estis ĉefe, ke ni kontentige (por ni mem kaj niaj kontaktrilatoj) laboras, se oni pripensas niajn fortojn kaj eblojn.

La protokolon kaj la ekonomian bilancraporton de la jarkunveno oni povas havi ĉe la sekretario.

Ni daŭre provas esti bonaj membroj de 'niaj tri umbreloj' - FISAIC, IFEF kaj Jernbanefritid. Laŭ nia opinio ni bone sukcesas, kun niaj fortoj kaj ebloj. La grava afero estas, ke ni estas 'videblaj' – kaj tion ni provas per verkado de artikoloj, partopreno en kunvenoj k.s.

La kongreson de IFEF en Colmar 2017 partoprenis 3 DEFA-membroj, kaj estis tre kontentige ... ankaŭ la reprezentantaran kunvenon de Jernbanefritid en novembro partoprenis 3 de nia societo.

'Hejme' ni provas kunveni kaj kunesti laŭ ebloj kaj fortoj unufoje monate, kaj tion ni daŭrigos – por orientiĝi pri IFEF, Jernbanefritid kaj FISAIC - ni povas fieri kaj esti kontentaj pri niaj aktivecoj, - ni renkontiĝas, manĝas kune, solvas taskojn ... kaj kelkfoje vidas fotojn de okazintaj kongresoj kaj parolas pri la multaj komunaj travivaĵoj kaj memoroj.

Ni prezentis prelegon dum la kongreso en Colmar pri Odense Letbane, kaj ankaŭ en 2018 dum la kongreso en Vroclavo estos kontribuo de DEFA.

DEFA

# DEFA 70-jariĝis kaj festis



Kiel antaŭe anoncite DEFA atingis la aĝon de 70 jaroj. La 20an de marto kolektiĝis 5 membroj, 2 gastoj kaj reprezentanto de Jernbanefritid ĉe Erik en Køge por amika kunestado, bona manĝo kaj ioma celebrado de la naskiĝtago.

John Nielsen, vicprezidanto de Jernbanefritid, ĉeestis, gratulis kaj transdonis belan mondonacon al nia societo. Nia prezidanto, Jan Niemann, faris etan paroladon, sed escepte de tiuj du 'oficialaĵoj' ni simple amuziĝis sen striktaj reguloj.

La vivo de DEFA estis dum la jaroj tre 'diversspeca'. De tre modesta komenco kaj kuraĝa organizo de la unua kongreso de IFEF evoluiĝis la DEFA-societo al floranta organizo kun kluboj dise en la lando.

La kluboj organizis kursojn, prelegojn, kantvesperojn, vojaĝvesperojn, festojn ... DEFA partoprenis kunlaboron kun la lokaj DEA-kluboj por organizi prelegvojaĝojn kaj komunajn jarkunvenojn ... la membroj diigente partoprenis IFEF-kongresojn kaj eĉ estraran laboron en IFEF.

DEFA organizis entute kvin kongresojn de IFEF, la unuan en 1949 kaj la kvinan en 1998 – la unuan, la 10an, la 25an, la 37an kaj la 50an kongresojn de IFEF, ĉiam bone organizita kun bunta programo kaj kontentaj partoprenantoj (kaj lacaj organizantoj) – ĉiam kun pli kaj pli da teknologiaj helpiloj. Granda, eĉ grandioza plenumo de pli ol la devo por landa asocio de IFEF.




Trafoliumo de malnovaj numeroj de Dana Fervojisto (antaŭe DEFA-bulteno) estas respegulo de la vivo de DEFA, sed ankaŭ bildo de la evoluo de DSB (kaj poste ankaŭ Banedanmark) kaj la laborkondiĉoj de fervojistoj kaj ties familioj tra la jaroj.

Ni ne plu estas fortaj, - oni povas diri, ke DEFA estas modesta kiel je la komenco, kaj ni agas laŭ niaj fortoj kaj eblecoj. Ni partoprenas laboron en Jernbanefritid kaj IFEF, kaj lastatempe DEFA-ano transpenis estraran postenon ĉe FISAIC. Ni povas esti kontentaj kaj ankaŭ fieraj pro niaj atingoj.

Gratulon al ni ĉiuj!

DEFA

# DEFA-aktivecoj dum la venontaj monatoj

Dum la lastpasintaj monatoj ni devas konstati, ke ni ne povas ĉion plani antaŭe – ni devas akordiĝi al la kondiĉoj, kiujn ni alfrontas. La averaĝa aĝo de la membroj altiĝas,kaj la sanstato ne ĉiam obeas al la 'DEFA-datoj' (fakte ni devas konstati ankaŭ, ke ne ĉiam estas la pli aĝaj membroj, kies sanstato malobeas).

Pro tio ni decidis pri alia 'strategio' ... kompreneble ni volas daŭre kunveni kaj kunesti, sed ni decidis aranĝi la kunvenojn estonte 'de unu al alia' – ni simple telefonos kaj interkonsentos pri kunveno. Oni povas kontraŭ tio diri, ke la membroj, kun kiuj ni ne havas ĉiutagan kontakton, povas esti ĝenataj de tio, sed ni interrete informos al tiuj almenaŭ unu semajnon antaŭe.

Ni provos nun tiun sistemon kaj vidos, kiel funkcios.

Informojn pri la kunvenoj kaj pri la aktivecoj de DEFA entute vi povas ĉiam havi ĉe la prezidanto Jan Niemann, tel. +45 71 70 63 83, rete niemann@kabelmail.dk.

Bonan someron al ĉiuj deziras la estraro!

# Aliaj Esperanto-aktivecoj en Danio:

## Kopenhago

***Kunvenoj de KEK*** (prezidanto: *Bent Jensenius,* tel 38 60 15 86, retadreso kek@esperanto.dk) okazas en *Kulturhuset, Tomsgårdsve*j 35, 2400 *Kbh NV*. Vidu ankaŭ www.esperanto.dk

## Århus

***Kontaktulo pri DEFA*****:** La prezidanto.
Kunvenoj okazas kunlabore kun la Esperantoklubo de Århus en *Folkestedet, Carl Blochs Gade* 28, 1ª etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

## Norda Jutlando:

Kunvenoj de Nordjutlanda Esperanto-Klubo (informoj: *Ejnar Hjorth*, tel. 98 13 40 40) okazas en la vintra sezono (septembro-majo) ĉiumerkrede je la 15-a horo en *Christiansgade 38, 1., Aalborg*




*Málaga*, la urbo de 71-a IFK 3/5-9/5 2019

# La arkta konekto

La revo estas: la plej mallonga vojo inter Ĉinio kaj Eŭropo. Ĉinaj ŝipoj interŝanĝas varojn en *Kirkenes* aŭ alia nord-norvega haveno kaj ŝparas milojn da marmejloj kompare kun la *Suez*-kanalo.

Mankas du aferoj por tiu grandioza revo: 500 km da fervojlinio de la Arkta Oceano al la ekzistanta finna fervoja reto kaj submara tunelo inter Finnlando kaj Estonio.

Finnlando komprenas kaj interpretas sian situon inter Azio kaj Eŭropo en tute alia maniero ol antaŭe kaj estas vere aktivaj.


Jam ekzistas seriozaj studraportoj pri ambaŭ en si mem grandaj projektoj. Cetere Finnlanda entrepreno ĝuste nun serĉas ĉinan financadon de IT-kablo inter Eŭropo kaj Azio.

Estas nekredeble grandaj aferoj, sed la klimatŝanĝoj kaj la imago pri ĉina mono donis novan energion.

La submara tunelo inter *Helsinki* kaj *Tallinn* estos la plej longa en la mondo - 80 km. Sed ne estas nova plano: la unuaj desegnaĵoj datiĝas de la 19a jarcento. La prezkalkulo provizora: 15 miliardoj da EUR!

La registaro en *Helsinki* momente lasas la iniciaton pri tio al privata konsorcio, kiu dum la lastpasintaj jaroj estas tre aktiva.

La finna multi-milionulo *Peter Vesterbacka* (riĉiĝis pri i.a. la komputila ludo '*Angry Birds*') gvidas tiun entreprenon. Li supozas, ke ĉinaj investoj pagos du trionojn de la mono necesa. Lia entrepreno *FinEst Bay Development* kunlaboras kun du el la plej grandaj konstru-entreprenoj en la mondo: *Fira* kaj *Povry*. *Povry* estas konata i.a. pro la ĝis nun plej longa fervoja tunelo, *Gotthard-Basistunnel*. Ĝi longas 57 km.





*La revo*

*Vesterbacka* ne povas atendi, ĝis venos mono de Eŭropa Unio. Li estas tute certa pri la realeco en sia revo.

Li diras, ke la projekto estas interesa por liaj kontaktoj ne nur pro la tunelo, sed ankaŭ pro la konstruoj de multaj loĝejoj kaj oficejoj rilate al ĝi, ne malplej sur artefarita insulo en la finna golfo (kie la tunelo devas 'spiri'). Ĝi estos unu kvadratkilometron granda, konstruita de tero de la tunelfosado kaj estoas labor- kaj loĝloko por proksimume 50.000 personoj.

Estas diversaj opinioj pri la fokus-ŝanĝo al Azio, kiu ĝuste nun okazas en multaj rilatoj … sed kiel diris la finna direktoro de '*Arctig Buiness' Council*' (Arkta Komerca Konsilantaro) al gronlanda tagĵurnalo en marto:


*'Ĉinio estas grava kunludanto en la pan-arkta regiono, kaj Ĉinio estonte engaĝiĝos kaj involviĝos en multaj projektoj kaj rilatoj. Tion ni ne povas eviti – kaj tion ni ne povas malhavi!'*




Planoj pri tunelo ne estas novaĵo, planfolio de 1871. Rimarku ke estas grandegaj balonoj - ne pililoj - kiu portas la portkablonj...

Ankaŭ ĉe ni la diskuto pri ĉina envolviĝo estas signifa: *China Railway Group Ltd.* (Ĉina Fervoja Grupo), unu el la plej grandaj konstruentreprenoj pri fervojo, estis aŭtune 2017 trifoje en *Helsingborg* por esplori pri tunelkonekto inter Danio kaj Svedio.

Kompilis JUN+LN




En 2040 …

Fontoj:
*Weekendavisen* 09032019 (verkis *Martin Breum)*
*Martin Breum* hejmpaĝo
*FinEst Bay Development* hejmpaĝo




*Málaga*, gastiganto de la 71-a kongreso de IFEF kaj la 78-a Hispana Kongreso de Esperanto 2019

# La 70-a kongreso de IFEF okazis




Jam antaŭ du jaroj ni eksciis, ke okazos la 70-a, jubilea IFK en la silezia urbo Vroclavo – dek jarojn post la kongreso en *Poznan* (2008) kaj por la tria fojo entute en Pollando – verŝajne kelkaj legantoj memoras *Katowice* en 1987.

La kongreson organizis la polaj fervojistoj kune kun lokaj vroclavaj esperantistoj. *Teresa Pomorska* (vroclavanino) partoprenis la 2017-an,



Interkona vespero – *Teresa* bonvenigas

69-an IFK en *Colmar* por scii, kio estas ‘La fenomno IFK’.

Post interkona vespero sabate kaj tranokto post por kelkaj streĉa vojaĝo ni kolektiĝis en la bela muzika salono de la universitato, kie okazis la inaŭguro dimanĉe antaŭtagmeze.



Inaŭguro

Mi devas konfesi, ke mi iom konfuziĝis dum la semajno. Mi opiniis, ke ĉiuj programeroj okazu aŭ en hotelo *Piast* (kie multaj kongresanoj kaj ankaŭ mi loĝis), kiu ankaŭ en la programo portis la indikon ‘Kongresejo’, aŭ en la tute proksima kaj tre bela ĉefa stacidomo *Wrocław Główny*. Aliflanke mi komprenas, ke la organizantoj deziris montri al ni aliajn belajn lokojn kaj taŭgajn salonojn, sed sen multe da skriba informo pri trameblecoj, direkto-indikoj kaj haltejaj nomoj fariĝis iom pli komplika kaj okaze iom pli ĥaosa afero ol necese. Ne por ĉiuj nomoj kiel ‘*Hala Stulecia*’ estas facile memoreblaj kaj rekoneblaj.

Nu, ni ĉiuj atingis la celon por la inaŭguro de la kongreso en gloro. Ke oni volis uzi tiun salonon mi bone komprenas – ege bela ĝi estas. La rektoro de la universitato estas mem muzikisto, kaj li estis parto de la ‘kultura parto’ de la kongresmalfermo. Li ludis por ni uzante la pli ol 300-jaran orgenon de la muziksalono, kaj oni substrekis, ke ne ĉiutage oni malfermas la pordetojn al la orgeno! Kaj li li bonege ludis. Bela kaj

surpriza travivaĵo por la kongresanoj.



Gravuloj sur la podio

La programo de la kongreso estis plen-plene ŝtopita. La kultura kaj turisma flanko estis tre densa, interesa kaj impona, kaj oni ŝatus ĉion partopreni ... samtempe oni ja devas diri, ke la ĉefaj du terenoj de kongreso de IFEF estas la faka laboro kaj la organiza laboro, kaj ne ĉiam estis facile kunordigi ĉion. Kelkaj, kiuj preparis fakan prelegon, ne sukcesis prezenti ĝin pro manko de tempo, kaj kelkajn organizajn tre gravajn aferojn oni devis 'trakuri' por atingi ĝustatempe ekskurs-foriron. Estas domaĝe, sed ankaŭ 'luksa problemo', oni povas diri, kaj al la LKK de la venonta kongreso en Malago, Hispanio, oni devas tion klarigi. La hispanaj LKK-anoj, kiuj ne estas fervojistoj, ne havis eblecon esti en Vroclavo dum la tuta kongreso, sed estas grave, ke ili scios pri tiuj spertoj de la 70-a por faciligi ilian laboron.

Nepublika kaj publika komitatkunsidoj okazis, kaj ĝojiga estas la fakto, ke alvenis al la IFEF-familio nova landa asocio – de Kubo. Jam antaŭ kelkaj jaroj okazis ankaŭ, sed tiu asocio velkiĝis kaj formortis – nun provas fervojistoj (sufiĉe junaj!) en la urbo *Santiago de Cuba* denove. Ni bonvengias ilin kaj deziras al ili sukceson!



Kunsido – de maldekstre *Vito Tornillo, Rodica Todor, Guido Brandenburg*

La Faka Komisiono okazigis longdaŭran, sed konstruan kunvenon, dum kiu oni traktis la organizon de la grupo kaj la estonton ... oni povus dekomence timi pri la tuto, sed montriĝis, ke multaj pretas kunlabori, por ke ĉiujn taskojn ni plenumu kaj ĉiujn rilatojn ni flegu.



Faka eksurso al fervojmuzeo

Apartenas ankaŭ al la faka flanko, ke pro sia multjara kontribuo en la komisiono (en la fake aplika sekcio) *Ladislav Kovář* ricevis la titolon de Honora Membro de IFEF.

Ni ĉiuj sciis, ke la Nacia Vespero distra farintus granda travivaĵo – Pollando havas grandan tradicion de folkloro. Kaj tute prave – eĉ tri ensembloj distris nin per lokaj kaj aliregionaj dancoj kaj kantoj. Ĉiuj estis imponaj, sed eble precipe 'la meza' programero – la grupo *LEGNICA* – kaptis la korojn de ni ĉiuj.



*LEGNICA*

Dankon al ĉiuj, kiuj helpis doni al ni belajn travivaĵojn dum la kongreso – eĉ la veterdioj kunlaboris!

*Lene Niemann*

**Dana Fervojisto estas organo de Dana Esperantista Fervojista Asocio (DEFA)**

Prezidanto:
Jan U. Niemann
Hovedvagtsstræde 9 E, 1
DK-3000 Helsingør
tel 71 70 63 83
aŭ 71 72 32 42
niemann@kabelmail.dk

Kasisto: Karen K. Olsen
Manøvej 6
DK-4700 Næstved
tel 55 72 73 77
bankkonto (Lån&Spar)
0400 107 10 07539

Redaktantoj: Jan kaj Lene Niemann
Vidu adreson supre.

Preso: HVS9E1

Redaktofino por venonta numero de Dana Fervojisto:

1/11-2018

# Enhavo:

paĝo 2 DEFA ĝeneralkunveno
paĝoj 3-4 DEFA 70-jariĝis
paĝoj 5-6 Aktivecoj
paĝoj 7-10 La arkta konekto
paĝoj 11-15 La 70-a IFK

## UEA kongresos denove en Eŭropo – ĉu vi iros al Portugalio kaj Lisbono?

La kongreso okazos de la 28-a julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Ĝis nun aliĝis 1440 personoj el 74 landoj.